

Numero: 279.
Aŭgusto: 2015.

23-a jarkolekto

Literaturaj Folioj

VESPERTO



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefono: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Barilo

La politiko ne estas la celo de LITERATURA FOLIO. Komence mi tute deziris eviti ĝin. Komprenbele ankaŭ en la estonto mi ŝatus se mia modesta eldonaĵo estus sen politika kaj ĉefe en ĝi enhavus literaturaĵojn.

Malgraŭ tio mi demandas, ĉu ekzistas neŭtrala gazeto kaj revuo?

Kiu diras, ke lin ne interesas la politiko kaj li estas sendependa de ĉiu tendenco.

La nuna somero estas varmega en Hungario. Sed ne nur pro la vetero. Verdire ankaŭ la sunradioj bruligas nian haŭton kaj tagmeze iri eksteren estas danĝera.

Mi ne intencas politikumi, sed mi ne povas preteriri la konstruatan barilon ĉe la hungara – serba landlimo kontraŭ la migrantoj.

Tiuj malfeliĉuloj amase venas en Eŭropon. Dio scias, kio estas la celo de ilia „rifuĝo”? Certe inter ili estas homoj, kiuj efektive vivas en danĝeraj cirkonstancoj. Mi ne estas prudenta por antaŭdiri tiu ĉi fenomeno kondukos al la formorto de la Eŭropa civilizacio kaj kulturo.

Ĉu por ni estos bona tiu ĉi ŝanĝiĝo? Laŭ mi la ĉesigo de Eŭropo kaj la transformiĝo al nova, miksitita kontinento ne estos bona. Neniu profitos el ĝi, eĉ la afrikanoj baldaŭe spertos ankaŭ, tie ĉi ne estas Kanaano.

Jes, oni devas konstrui la barilon, sed ne nur ĉe la hungara – serba landlimo. Ni komencu konstrui barilon ankaŭ en la kapoj por ke la degeneritaj pensoj ne invadu la penson. Ĉiu sciu sian lokon sur la terглоbo kaj neniu forlasu sian patrujon. Por defendi la naskiĝlandon estas ĉiu tasko. Trovi hejmon en alia lando ne estas ĉiam bona solvo.

La mondo estas multnacieca. Mi ne ŝatus vivi sur tia terглоbo, kie estos terenoj, kiujn la praloĝantoj forlasis.

Se en nia kapo konstruiĝos la barilo, eble tiam ĉe landlimoj ne estos necesaj pikdratoj, ĉar homoj envenas tra la pordo kaj ne tra la fenestroj, kiel ŝtelisto.

Ni vivu en tiu lando, kie la homoj fartas bonege ankaŭ en sia lando – sed ĝis tiam la barilo estas necesa.

-Redaktanto-



Mortkondamnito

Viro estis mortkondamnita pro la insulto de la reĝo.

Gvidante lin al la pendumilo la ekzekutisto demandis:

-Kio estas via lasta deziro? Ni lastfoje plenumos tion.

La mortkondamnito longe cerbumis en la ekzekutejo. Fine la ĉeestantoj urĝigis lin:

-Kiom longe ni atendu? Ankoraŭ hodiaŭ ni matenmanĝis. Ni ĉiuj estas malsataj. Diru rapide vian lastan deziron!

La mortkondamnito eklevis siajn okulojn al la ĉeestantoj kaj ekzekutisto. Post iom da tempo li trankvile elbuŝigis:

-Mi deziras ellerni ĉiun ekzistantan lingvon de la terглоbo. Espereble mi ne petis ne plenumeban. Ĉu ne?

La homoj rigardis unu al la alia. Ŝajnis, ke ĉies mieno blankiĝis pro la nekutima deziro. Aliaj mortkondamnitaj ĉiufoje petis cigaredon lastan aŭ manĝaĵon, trinkaĵon. Sed tiu malfeliĉulo volas lerni lingvojn.

Kion fari en tiu ĉi stranga situacio? Ĉu oni devas plenumi ĝin?

La jurofakuloj febre komencis serĉadi en libroj kaj studaĵoj, ĉu jam okazis simila deziro en la historio?

Nenie ili trovis tian strangan, nekutiman deziron.

La ekzekuto estis prokrastita. Oni reakompanis al lia ĉelo kaj li restis tie ĝis la nova juĝo.

Juĝistoj, advokatoj kaj ĉiu fakulo de leĝo tage – nokte diskutadis pri la situacio. Ĝis nun ankoraŭ ne ekzistis simila kazo.

Post longaj semajnoj ili interkonsentis, oni devas plenumi la lastan deziron de la mortkondamnito. Li lernu ĉiun ekzistantan lingvon de la terглоbo!

Baldaŭe la ĉelo pleniĝis kun gramatiko kaj diversaj lingvohelpiloj. Estis tie almenaŭ mil vortaroj kaj helpmaterialoj.

La mortkondamnito diligente komencis lerni la fremdajn lingvojn. Ankaŭ spertaj lingvoinstruistoj helpis en la lingvolernado.

Vane ili klopodis, ellerni unu lingvon bezonis jarojn. Do, tio signifis la mortkondamnito lernis ankaŭ kvindek jaroj ĝis la tombo, kiam li mortis je malsano.

Tiam li jam sciis dekkvin lingvojn el la pli ol kvarmil ekzistantaj lingvoj.

Kio okazus, se li estus elektita Esperanton? – Certe tiam la ekzekutisto plenumintus la mortkondamnon.

-Ŝaŝa-



Aventuroj sur Luno

-Verkis: Apáti Kovács Béla-
XIV-a

Nesciante kial, Johano obeis al la virino. Li iris maŝine. Li timis kaj li estis tute frakasita. Certe tio ŝvebis antaŭ li, ke baldaŭe li liberiĝos kaj li denove estos ekstere.

Ili trairis longajn koridorojn. La tuta konstruaĵo estis lukse instalita. Malgraŭ tio nun Johanon tio ne interesis. Li havis unusolan deziron: rapide liberiĝi el tiu ĉi sufoka sonĝo.

Strange nenie ili vidis homojn. Ĉiu ejo estis senhoma.

Post longa marŝado ili eksteriĝis kaj Johano denove sentis sub sia plado la surfacon de Luno kaj estis agrable enspiri la freŝan ozonan aeron. Kvazaŭ ili estintus en verda, bonodora arbaro.

Post la liberiĝo el la konstruaĵo Johano turnis sin al la junulino:

-Ĉu efektive vi estas Elinjo? Lasu min preni vian manon por ke mi sentu, ke vi estas sangokarna estaĵo kaj vi ne estas fantomo.



Elinjo ekridis kaj ĵetis karan rigardon al li.

-Kial vi pensas, ke mi estas fantomo?

-Mi jam ne scias, kion pensi? En la lastaj tagoj okazis al mi multaj, neklarigeblaj aferoj. Mi tute ne komprenas, kial mi estis forrabita? Ĉu vi scias, kio okazis? Se jes, bonvolu klarigi ĝin al mi! Kie vi estis, kiam oni min forrabis?

-Kara mia – komencis milde Elinjo – unue trankviliĝu kaj poste mi klarigos al vi ĉion. Ĉu bone?

-Ĉu ekzistas klarigo je mia forrabo? – demandis mire Johano.

-Komprenble. Ne estu malpacienca! Ne estas facile klarigi ĉion.

-Kara Elinjo, vi ne scias, kion mi travivis. Plurfoje mi sentis, ke mi mortos. Mi venis al Luno por ferii, kaj fine mi preskaŭ mortis. Verdire mi ne scias, ĉu miaj suferoj efektive finiĝis aŭ ankoraŭ sekvos aliaj torturoj.

La virino silentiĝis kaj ŝi ĉirkaŭbrakumis lin. Ŝia kisego estis arda kaj dolĉa, kiel la mielo. Tio ĉi kapturigis Johanon. En sia tuta korpo li sentis agrablan svarmadon. Li timis, eble ankaŭ tio estas

trompo kaj baldaŭe sekvos senreviĝo, kiel jam multfoje dum la Luno ferio.

-Kien ni iras nun? – li demandis.

-Laŭ mi estus bone unue iri al via onklino Izabela. Ĉu ne? Mi akompanas vin ĝis la loĝejo de Izabela, sed mi ne iros kun vi supren en la loĝejon. La oldulino ne ŝatas min, eĉ.... – ŝi ne finis la frazon.

Ili veturis per aerotaksio al la kvartalo, kie loĝas la onklino de Johano. Antaŭ la domo ili adiaŭis unu de la alia.



-Ĝis morgaŭ! – diris iom malgaje Elinjo. – Morgaŭ ni renkontiĝos. Ĉu bone?

-Ĝis, kara! – venis rapide la respondo. – Kie?

-Mi atendos vin, tie ĉi antaŭ la domo.

-Estas en ordo. Ho, pardonu min, Elinjo!

-Bonvolu!

-Ĉu la danĝero finiĝis? Ĉu mi ne devas timi de la okazontaĵoj? Ĉu mi ne estos denove forrabita, kiel el la restoracio?

-Laŭ mi ne – respondis Elinjo kaj ŝi ekiris al la centro de la urbo.

Johano restis sola. Li suprenrigardis serĉante la fenestrojn de sia onklino en la kvincent sepdek tria etaĝo. Pro la nuboj li vidis nur proksimume ĝis la centa etaĝo. La supro de la konstruaĵo malaperis en la ĉielo.

Iom li hezitis antaŭ la domo, kvazaŭ ne sciante, ĉu supreniri aŭ ne. Por li estis sekreto, kiel li estos akceptita. Ĉu la onklino Izabela ĝojos aŭ ŝi estos kolerema, kial li ne akceptis ŝian konsilon. Ja, ŝi antaŭvidis la danĝeron. Ŝi avertis Johanon ne renkontiĝi ikun tiu ĉi ĉarma kaj belega junulino, kiu tute frenezis ŝian nevon.

La pordo aŭtomate malfermiĝis. Ankoraŭ ĝi ne estis ŝlosita.

Johano atendis kelkajn minutojn pri la rapida lifto kaj kiam ĝi alvenis, li enpaŝis ĝin kun pulsanta koro.

(-daŭrigota-)



Poezio

Kial oni verkas versojn? Certe ĉiu jam sentis, ne sufiĉas prozo, simplaj frazoj. Tie ene estas io, nekutima sento, kiel vulkano volas erupcii kaj per lavo kovri ĉion.

Ĝi estas tiu momento, kiam oni ekprenas skribilon kaj surpaperigas la internajn pensojn montrante al la mondo, kio loĝas ene profunde en la koro.

Ne ĉiu fariĝas poeto. Sed laŭ mi oni devas liberigi tiun etan birdon, kiu kantas senpauze kaŭzante ĝojon aŭ triston.

Ne el ĉiu fariĝos poeto. Tiel estas bone, sed estus kulpo estingi en ni la fajron. Tio ĉi signifus la morton de la poezio.



Sándor Petőfi

La poetoj de la XIX. centjaro

Facilanime sin neniu
dediĉu al surkorda lud':
tre gravan taskon entreprenas,
kiu nun tuŝas al liut'.

Se vi kapablas sole kanti
pri l' propraj ĝojo kaj dolor',
ja vin la mondo ne bezonas,
la sanktan lignon metu for!

Ni migras en dezerto, kiel
la judoj laŭ la voj-preskrib'
de l' flamkolono, kiun Dio
alsendis por la migra trib'.
Nuntempe, kiel flam-kolonajn,
poetojn donis Dia man',
ke ili gvidu la popolon
el la dezert' al Kanaan'.

Poetoj, do tra fajro-akvo
ek por popol', ek por la ver'!
Malben' al ĉiu forĵetinta
standardon de l' popol-liber'!
Malben' al ĉiu postrestanta
pro pigro aŭ pro malkuraĝ',
ke, dum aliaj luktas, ŝvitas,
li mem ripozu en ombraĵ'!

Estas profetoj falsaj, kiuj
malice trompas per malver',

dirante: Haltu, ĉar ni staras
jam sur la promesita ter'.
Mensog', mensog' impertinenta!
Jen milionoj por refut',
kiuj malsate, malespere
sin trenas sub la ŝarg' de brut'.

Se preni el abundo-korbo
egale ĉiu povos jam,
se lokon ĉe la rajto-tablo
egale ĉiu trovos jam,
se lumo de spirit' lumigos
Ĉiun fenestron de kaban',
tiam ni povos diri: Haltu,
jen estas jam la Kanaan'.

Sed plu ĝis tiam, plu senhalte,
ni penu, luktu plu sen ĉes'!
Se l' vivo eble la klopodojn
pripagos per nenias prez',
ja l' mort' okulojn niajn fermos
per milda kiso, dolĉa rav',
kaj silk-kusene per florĉeno
subblasos nin al tomba kav'.

Kalocsay, Kálmán



Kolománo Kalocsay tradukis la supran poemon de
Petőfi Sándor

Poemojn ne nur legu, sed aŭskultu kun muziko!
Sube estas retadreso. Klaku aŭ enkopiu ĝin! Mi
garantias Vin travos eksterordinara travivaĵo

<http://www.mp3freex.biz/mp3/La+Perdita+Generacio+-+Societo+De+Vivantaj+Poetoj>



Por infanoj

VENTETO



Ĉu vi aŭdis pri venteto? Se ne, tiam nun mi rakontas pri ĝi al vi.

La venteto vivis inter la altaj montoj kun siaj gepatroj. Ĝi ankoraŭ ne povis iri al vilaĝoj kaj urboj, kiel ĝiaj pli aĝaj gefratoj. Ĝi estis tro malgranda kaj ili ne permesis forlasi la domon. Unue venteto devas lerni multe. Krom tio ĝi devas fortiĝi.

Tio ĉi ne plaĉis al la venteto. Ankaŭ ĝi deziris viziti la vilaĝojn kaj urbojn. Laŭ la rakontoj de siaj gefratoj ĉiam estas bonega amuzo kuregadi inter la domoj de la homoj kaj frapeti sur la fenestroj timigante la domantojn.

-Paĉjo, ankaŭ mi volas iri al la vilaĝo kaj urbo kun miaj gefratoj – petegis la ventego.

-Ankoraŭ vi estas juna por tiom granda ekskurso. Se vi estos bona kaj vi diligente ellernos la sciindaĵojn, tiam en la sekva jaro vi povos veni kun mi al la ĉefurbo.

Estis alloge la promeso de la patro, sed tamen por venteto la sekva jaro estis tre malproksima.

En iu tago, kiam ĉiuj foriris kaj nur ĝi restis hejme. La patro ordonis al ĝi lerni la regulojn de la ventoj.

Ĝi estis tre enuiga. La venteto ne ŝatis la regulojn. Nun prefere ĝi kuregadis kun siaj gefratoj.

Vane ĝi legis la lernolibron, el la leciono ĝi komprenis nenion.

Fine ĝi fermis la lernolibron kaj komencis cerbumi, kion fari?

La gepatroj kaj gefratoj longe forestos. Nur vespere ili venos hejmen. Ĝis tiam estas multe da tempo.

Certe neniu eksciis, se ĝi vizitus la proksiman kampon, kie homoj laboris. Verdire ĝia patro malpermesis al ĝi forlasi la domon. Sed ĝi ne povis liberiĝi de la penso kaj post iom da hezitado ĝi ekiris al la kampo.

Rapide ĝi alvenis. Efektive la kampo estis malantaŭ de ilia domo.

Suno arde brilis kaj pro tio la laborantaj homoj ege ŝvitis. Ili rikoltis grenon. Nenie estis ombro por ke ili povu ekriposti, refreŝiĝi iomete.

Komence la venteto rigardis la rikoltantojn. Ili tre suferis pro la varmego. Ili devis rikolti ankoraŭ

grandan terenon. Ili deziris fini la laboron ĝis vespero.

La venteto kompatis la homojn kaj decidis helpi al ili. Ĝi ne povis falĉi, eĉ sen brakoj ankaŭ la garbojn ĝi ne povis kolekti. Jam ĝi pensis tion, ke hejmeniros, ĉar ĝi ne povis rigardi ilian suferon, sed en la lasta momento ekfulmis en via kapo grandioza ideo.

Ĝi kurados super la kampo kaj tiel ĝi movigos la aeron. Eble ĝi donos iom da refreŝiĝon por la rikoltantoj.



La venteto eksaltis kaj tien – reen kuradis. Baldaŭe ĉiu sentis tion. La homoj feliĉe suprenrigardis kaj diris:

-Dank' al la venteto, ni tute refreŝiĝis. La aero ŝanĝiĝis kaj ni jam tute bone fartas. Ne estas varmego kaj ni povos fini la laboron ĝis vespero.

La venteto estis kontenta. Sed kion diri hejme al la gepatroj. La patro malpermesis forlasi la domon. Ĝi estis malobeema. Certe ĝi estos punata, se la familianoj hejmeniĝos.

Efektive la patro jam en la urbo aŭdis pri la ago de sia fileto. Unue li tre koleriĝis, sed fine ĝi mildiĝis.

Hejmenveninte li diris al la venteto:

-Vere vi estis malobeema kaj nun mi devus puni vin, ĉar vi forlasis la domon malgraŭ mia malpermeso. Sed vi helpis al la rikoltantoj, tial en tiu kazo mi pardonas al vi. Ŝajne vi jam estas granda knabo, kaj venontfoje ankaŭ vi povos veni kun ni al la vilaĝo kaj urbo kuregadi inter la domoj.

La venteto estis tre feliĉa, kiam ĝi enlitiĝis kun siaj gefratoj.

-Onklo Adalberto-



Somerfino

Somerfino

